

Vakcino kontraŭ falsaj novaĵoj: partoprenu en esploro

■ Rakoen Maertens

Dubo, malfido, polusigo. La socio suferas de miskomunikado kaj miskompreno. Unu el niaj celoj kiel esperantistoj estas malpolusigo kaj plibonigo de komunikado. Sed kiam homoj, esperantistoj eĉ, komencas diri ke aliaj homoj komunikas falsajn novaĵojn, kaj debatoj regataj de emocioj komenciĝas, la Skatolo de Pandora malfermiĝas. Ĉu la faktoj ankoraŭ gravas en la fino, aŭ ĉu ni vivas en epoko de relativismo, en kiu la plej bona oratoro kun la plej multe da amikoj ĉiam venkas?

Misinformado, la disvastigo de malveraj aŭ torditaj informoj, estas problemo, kiu ankaŭ kaptis la atenton de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko (por enkonduko, vidu la Unesko-Kurieron pri la temo ĉi tie: <https://en.unesco.org/sites/default/files/2017-2-esperanto-3.pdf>). Unesko, ekzemple, lanĉis manlibron (<https://en.unesco.org/fightfake-news>) por enkonduki la batalon kontraŭ falsaj novaĵoj kaj por la protektado de bonkvalita ĵurnalistiko. Kvakam internaciaj organizoj provas protekti vin, ĝenerale homoj – eble vi estas unu el ili – pensas ke falsaj novaĵoj ne influas ilin. Tamen, scienca esploro montras, ke kiam ni testas homojn, kiuj pensas tiel, per bone elektitaj falsaj novaĵoj kaj veraj novaĵoj, oni ne bone kapablas distingi. Do, kion ni faru?

Unu el la grandaj tendencoj estas tiu de faktokontrolistoj kiel *Politifact* kaj *Snopes*. Pluraj pensas, ke kiam oni

povas sukcese malpravigi la falsajn novaĵojn, homoj ŝanĝas sian opinion kaj sekve ne plu estas influataj de tiaj falsaj novaĵoj. Tamen, bedaŭrinde, esploro montras, ke tio kutime ne bone funkcias, kaj eĉ se oni sukcese malpravigis mesaĝon, la mesaĝo ankoraŭ influas nin. Eĉ se vi pensas, ke la novaĵo estas malvera, ĝi havas sian influon, kelkfoje eĉ sen via konscio. Kiam ni pensas pri problemoj kiel klimatsanĝiĝo, ne estas malfacile imagi, ke tio povas havi detruajn sekvojn por la mondo.

Tamen, ni havu la esperon. Esploristoj sukcese provas krei psikologian vakcinon kontraŭ falsaj novaĵoj, kiu, anstataŭ malpravigi falsajn novaĵojn post kiam ili influis vin, protektas vin antaŭ ol ajna influo povus okazi. Surbaze de teorio el la socia psikologio, nomata “inokula teorio”, ni kre-

is manieron por ebligi la kreadon de mensaj antikorporoj kontraŭ misinformado. Pli specife, ni kreis edukon ludon, kiu instruas kiel influo funkcias, kaj kiom facile eblas krei falsajn novaĵojn. Pli specife, en la ludo, kiu estis kreita de esploristoj ĉe la Universitato de Kembriĝo, la partoprenantoj devas memstare krei falsajn novaĵojn kaj amase disvastigi ilin. En simulado de socia retejo, la partoprenantoj devas zorgi, ke ili atingu tiom multe da sekvantoj kiel eblas, kaj dume resti sufiĉe kredoblaj. Vi do devas pensi pri tio, kiel influo funkcias, kaj kiel ĝi estas plej forta en sociaj medioj. En la ludo vi ankaŭ vidas, kiajn malbonajn sekvojn la disvastigo de falsaj novaĵoj fakte kunportas, kio funkcias kiel forta averto.

Anstataŭ protekti kontraŭ specifaj mesaĝoj mem, la ĉefa afero ĉi tie



estas la metodoj de intenca misinformado. Vi lernas kiel la ĝeneralaj metodoj funkcias, kaj kiom facile estas krei kredeblajn falsajn novaĵojn. En la ludo, vi lernas pri *dispolusigo*, *trolado*, *misuzo de emocioj*, *ŝtelo de identeco*, *misfamigo* kaj *komplotteorioj*. La unuaj studoj en nia esplorgrupo montras ke post ludado, vi pli bone distingas inter veraj kaj malveraj novaĵoj. Ni do trovas la unuan signon, pri tio ke la vakcino funkcias. Tamen, samkiel multe da esploro, la testpubliko venis ĉefe el landoj kun la angla kiel unua lingvo, kaj do restas la demando: ĉu la vakcino funkcias tutmonde kaj plurkulture?

Por trovi respondon al tiu demando, mi proponis en la Universitato de Kembriĝo fari plurkulturan studon pri nia vakcino, en kiu ni komparas ĝian efikecon en pluraj landoj. Pli specife, ni ricevis la permeson traduki la ludon al Esperanto, kaj gvidi la studon. Nun, kun plezuro mi anoncas al

vi la Esperantan version de la vakcino: www.misinformado.net.

Nun restas unu plia tasko: **divastigi**. Ni havas la eblon por publikigi altnivelan studon ĉe la Universitato de Kembriĝo, en kiu Esperanto havas gravan rolon. Sed por tion atingi, ni bezonas sufiĉe multnombrajn kaj sufiĉe diversajn partoprenantaron.

En la ludo vi havas la elekton por partopreni en la studo, kaj vi devas fari tion komence kaj fine de la ludo. Se unu el la du mankas, la tuta partopreno de tiu homo perdiĝas, do tre gravas fari la tuton.

Ni montris la unuan version de *Misinformado* dum la *Unesko-Forumo pri Scienco* en Moskvo (novembro 2018), kiu donis bonegajn impresojn. Reprezentantoj laŭdis la fakton, ke ni uzas Esperanton por tiaj gravaj temoj. Ni

poste oficiale lanĉis en decembro 2018 kaj prezentis *Misinformado* dum la Esperanto-konferencoj Luminesk' (Germanio) kaj JES (Germanio). Tamen bedaŭrinde, malgraŭ la fakto, ke ĉio bezonas nur 15-20 minutojn, ĝis nun nur 33 homoj plenigis ĝin kun partopreno en la studo. Pli specife, 20 el Eŭropo, 7 el la Amerikoj, 0 el Afriko kaj 6 el Azio.

Mi bezonas almenaŭ po 100 personoj (100 el Azio, 100 el la Amerikoj, 100 el Afriko, 100 el Eŭropo), kaj plej prefere en ĝi partoprenu homoj, kiuj ne scipovas la anglan aŭ venas el malriĉaj regionoj. Mi do petas vin: uzu la ludon en viaj Esperanto-lecionoj, iru al viaj lokaj kluboj, komuniku al la Afrikaj kaj Aziaj kluboj, kaj plu.

Plie, se vi estas en grupo, mi tre aprezus, se vi prenos foton de tiu grupo post la kompletigo de la ludo kaj partopreno en la studo. Estus bonege montri kiom diversa Esperantujo estas, kaj mi povos tiam montri la plurkulturecon de nia partoprenantaro al povaj homoj en Kembriĝo. Ankaŭ poste, kiam mi prezentos la rezultojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kie mi planas prezenti la studon, se ni atingos la bezonatan kvanton. Vi povas sendi la fotojn al mail@rakoen.be aŭ sendi Twitter-pepon al [@RakoMaertens](https://twitter.com/RakoMaertens). Mi esperas, ke julie ni havos la bezonatan partoprenantaron, por ke mi povu prezenti al vi la rezultojn en scienca prelego dum la UK en Lahtio.

Pri la informa sekureco de UEA

■ Dima Ŝevĉenko,
Anna Striganova

Universala Esperanto-Asocio dum pluraj jaroj sufiĉe sukcese stiras la lokomotivon de informado pri Esperanto kaj pri la Esperanto-movado ene de la Esperanto-komunumo kaj ankaŭ ekster ĝi. Certe, ekzistas kelkaj mankoj kaj problemoj, pri kiuj indas zorgi. Ĉi-kampe la Asocio jam estas survoje al perfektigo. Malgraŭ ĉiuj obstakloj UEA nuntempe restas la plej stabila kaj granda Esperanto-organizo kun la plej granda reto de informfluo pri kaj

en Esperanto. Al tiu reto apartenas pluraj amaskomunikiloj kaj informaj platformoj, pri kiuj UEA zorgas mem, aŭspicias aŭ/kaj subtenas.

La revuoj *Esperanto* kaj *Kontakto* estas konataj en Esperantujo periodaĵoj, kiuj ĝis nun aperas ankaŭ paperforme. Dum jaroj oni revis pri la eldono de *Unesko-Kuriero* en Esperanto. Kaj tiu revo realiĝis en 2017, kaj iĝis unu el la plej grandaj atingoj de UEA dum la lastaj jardekoj en la kampo de la ekstera informado. Paradokse, sed eldono de la paperaj periodaĵoj en la nuna mondo prestiĝigas la Asocion. En la cifereca

epoko pli kaj pli da organizoj nuligas la paperajn eldonojn kaj aperigas ilin diversmaniere nur elektronikforme. Paperaj eldonaĵoj nuntempe havas pli reprezentan funkcion, kaj estas montrataj en diversaj forumoj (ekzemple, organizataj de Unesko), foiroj, festivaloj, estas uzataj dum pluraj majstroklaso, kursoj ktp.

UEA ankaŭ aktive evoluigas la interretajn informflujojn: daŭre estas dissendataj la tradiciaj Gazetaraj Komunikoj kaj aktive evoluas la *Reta Revuo* kun ĉiutagaj publikaĵoj. La esperantistaro estas informata ankaŭ pri